


ĝis revido | até a próxima



BILDO | HALIL' GIBRAN

M > 24



MAJENTON!

AŬTUNO2004

brazilaesperantistajunularaorganizo **BEJO**

MOMENTON!

#04 AŬTUNO 2004 | OUTONO 2004

Saluton, kamaradoj!

Plezure mi malfermas ĉi tiun jaron kiel redaktoro de Momenton, kaj tiel mi esperas daŭri dum multe da tempo. Kiel ofte okazas kiam ni renkontas iun unuafoje, oni sin prezentas al la alia, kaj tio mi same faros.

Mi nomiĝas Rogener Pavinski, 23- jara, loĝanta en Ribeirão Preto (SP). Mia sperto pri redaktado limigas je la redaktado de videoj, kiu estas mia laboro kaj neniel rilatas al la ĵurnalisma fako. Amatora muzikisto, bruema gitaristo kaj hida blekisto, mi kursas teknikan kurson pri nutrado.

Tre malsamaj medioj, ĉu ne? Jes, tamen, se mi povus elekti, mi volus esti... poeto.



Laŭ mi, la plej bela profesio en la mondo estas la poem-verkado. Kaj Halil Gibran, kies etan biografion ni prezentas ĉi-numere, estis unu el la plej bonaj poetoj, kiu jam preterpasis ĉi tiun mondon. Nepras do konatigi kun la beleco de liaj verkoj.

Agrablan legadon!

REDAKTADO | Rogener Pavinski, Ribeirão Preto.

ARTO kaj EDITADO | Roger Borges, Barcelona.

SUPERVIZADO | Ísis Okabe Piton, Campinas.

REVIZIADO | James R. Piton, Campinas.

DISTRIBUADO | BEJO, fondita en 1967 (Landa Sekcio de TEJO ekde 1968).
Caixa Postal 1097 13001-970 Campinas, SP BRAZILIO

MOMENTON > Kvarmonata revuo de BEJO. momenton@esperanto.zzn.com

HĀLIL' ĜIBRAN >>>

LA POETO, LA FRENEZULO

Ĝibran Ĥalil' Ĝibran naskiĝis en 1883, en Bicare (Becharré) norde de Libano, urbeto 1500 metrojn alta ĉe la miljaraj libanaj cedroj kaj sojle de la Sanka Valo. Lia patro, simpla imposto-kolektantisto, estis drinkemulo kaj ludpasiulo, tamen li havis intelektulan kaj religiecan devenon laŭ la patrina familio.

Tre frue montriĝis liaj emoj al arto. Oni rakontas ke, li 8-jara, dum tempesto furioze falis sur la urbon, li malfermis la pordon kaj kuris laŭ la ventegoj. Kiam lia patrino sukcesis atingi lin, ekriprokante, li respondis: “Sed panjo! Mi ŝatas la tempestojn. Mi ŝatas ilin!” (Unu el siaj libroj nomiĝas “Tempestoj”)

Tiam en Libano regadis la Turko-Otomana Imperio, kio igis multajn homojn forlasi siajn nasklandon. Li estis 12 jara kiam li kaj lia familio translokiĝis al Bostono (Usono). La patrino laboris kiel kudristino kaj la plej aĝa frato starigis bazaron. Tie, li frekventis publikan lernejon, kie lia nomo resumigis al nur Ĥalil' Ĝibran. En la biblioteko, li pasigis siajn tagojn pentrante kaj legante verkojn de pensiuloj, filozofoj kaj verkistoj.

Sed en 1902, dum la spaco-tempo de nur 1 jaro, mortis lia 14-jara fratino, lia plej aĝa frato, kaj lia patrino (45-jara). Tiuj forpaso, precipe de la patrino, tre profunde suferigis lin.

“Al ĉiu homo sur la Tero, la plej pura vorto estas 'patrino'; kaj la plej dolĉa alvoko, estas 'panjo'. Tiuj etaj vortoj, de sublimaj valoroj, estas moldataj per la espero, per la amo kaj per ĉio kio belas kaj puras en la vivo. Patrino estas la konsolo en la tristeco, la helpo en abandono, la forto en la feblo, la fonto de tenero, kompato kaj pardono. Tiu, kiu perdas sian patrinon, perdas bruston kie kuŝi la kapon, manon kiu benas kaj rigardon kiu protektas”.



SUPRE | HALIL' GIBRAN



La unuaj libroj de Ĝibrano, inter 1905 kaj 1920, estis sekvo da ribelemaj verkoj, per kiuj, li esperis detruigi tradiciojn kaj instituciojn, denunci la malnoblecon kaj stultecon, ruinigi la tronon de la ambiciulojn, humiligi la eklezion, kiu “predikas tion, kion ĝi ne praktikas”, kaj starigi novan vivmanieron.

Kiam li translokiĝas al Novjorko, Gibran' amasigas aron da verkistojn libananojn kaj sirianojn, kiuj kvankam loĝantaj en Usono, verkas en la araba kun samaj renovigaj idealoj.

De 1918 Ĝibrano ekverkas en la angla. En tiu nova fazo, la revoluciulo fariĝas la filozofo, la saĝulo, pli interesata pri la homa animo ol la sociaj institucioj. Li estas konvinkita pri tio ke, la plej danĝeraj malamikoj de la homoj estas ene de si mem, kaj ke la kompreno estas plej bona ilo por reformi kaj progresi, ol la kondamno kaj detruo.

En 1923 li lanĉas sian majstroverkon: “La Profeto”. Ĝi tuj atingis sukceson, tradukita al 40 lingvoj.

Same kiel Nietzsche, li asertis ke tiuj, kiuj kredis je iu filozofio, devas entute vivi laŭ ĝi. “Ĉi tiu verko devos enhavi ĉion, kio mi estas. En La Profeto mi montras kelkajn principojn, de kiuj mi ŝatos esti la vivanta pruvo. Nur skribi tiujn idealojn estus la samo ol havi falsajn principojn. Mi nur povas akcepti ilin, vivante laŭ ili.”

Ĝibrano strebis pri la plibonigo de la homoj. Liaj verkoj, samkiel liaj pentraĵoj, estas profundaj, kvazaŭ elĉerpante vortojn kaj pensojn el la plej profunda valo de sia animo. Li plue lanĉis aliajn verkojn en la araba kaj en la angla, inter ili la notinda “Jesuo, la filo de la Homo”, antaŭ ol morti pro hepata nesuficeco en la 10-a de Aprilo de 1931.

Plurfoje Ĝibrano ekmontris deziron reveni por vivi en la Libanonaj montaroj, kie li naskiĝis. Post lia morto, lia korpo estis portita ĝis kajo en Bejruto. De tie, granda popululara karavano akompanis lin ĝis lia naskvilaĝo, kaj liaj cinzoj estis surteritaj en la Cedra arbaro, kiun li ĉiam amis.

“Arboj estas poemoj, kiujn la Tero skribas por la ĉielo. Ni ilin faligas kaj ilin igas paperon por registri nian malplenecon.”

‘PRI LA AMO’

Habil' Gibran

Tiam diris Almitra: “Parolu al ni pri la Amo.”

Kiel grengarbojn ĝi kolektas vin al si.
Ĝi draŝas vin por nudigi vin.
Ĝi kribras vin por liberigi vin de viaj ŝeloj.
Ĝi muelas vin ĝis blankeco.
Ĝi knedas vin ĝis vi estas fleksebla;
Kaj tiam ĝi transdonas vin al sia fajro, por ke vi fariĝu
sankta pano por la festeno de Dio.

La amo donas nur sin mem, kaj nur de si mem ĝi forprenas.
La amo nek posedas, nek volas esti posedita;
Ĉar por la amo sufiĉas mem la amo.

Kiam vi amas, ne diru "Dio estas en mia koro", sed prefere
"Mi estas en la koro de Dio". Kaj ne opiniu, ke vi povas
direkti la vojon de la amo, ĉar se la amo trovas vin inda, ĝi
vian vojon direktos.

La amo havas solan deziron sin plenumi.
Sed se vi amas kaj devas al tio havi dezirojn, ili estu la jenaj:
Fandiĝi kaj esti kiel fluanta rivereto, kiu kantas sian
melodion al la nokto.
Koni la doloron de tro multa amsopiro.
Esti vundita per via propra kompreno de la amo;
Kaj sangadi volonte kaj ĝoje.
Vekiĝi je la matenruĝo kun flugilhava koro kaj doni dankon
por la nova tago de amado;
Ripozi je la tagmeza horo kaj mediti la ekstazon de la amo;
Reveni hejmen je tagfino kun dankemo;
Kaj tiam dormi kun prego en la koro por la amato kaj
laudkanto sur la lipoj.

AMIKA JARFINO >>>

GRANDA ETOSO

“Amika Jarfino” okazis en Ilha Comprida/SP, de la 28-a de Decembro ĝis la 2-a de Januaro 2003. Estis harmonia, ĝoja kaj paca etoso en kunvivado dum tiu 5 tagoj, kun 17 partoprenantojn el ses malsamaj urboj.

Granda domo estis luprenita ne for de la plaĝo. Rodrigo de Méo el Sao Paulo, (pli konata en interneto kiel Rodrix) komentas, ke ni tie ludis kiel en "Granda Frato Brazilo"! :-)

“Je la alveno ni ‘konkeris’ la domon per E-flago”, raportis partoprenanto. Preter la oficiale aliĝintaj esperantistoj, oni malkovris raneton sur bantuko de Lunazzi en pendoŝnuro. Ja ĝi estis inter verduloj, do oni plentempe parolis nur en Esperanto.

Ne mankis aktivajoj: promeno tra la historia urbo Iguape, plaĝumado en Ilha Comprida kaj eĉ pramŝipa ekzkursio por atingi Juréia, granda ekologia rezervo de Brazilo.

Dum la kvaraŭta karavano de esperantistoj en vico por uzi la pramŝipon, okazis io amuza. Survoje kelkaj stirantoj, impresitaj de la E-flago, flankeniris por lasi nian

procesieton iri. Ili eble kredis, ke temis pri iu oficiala parado. Aliaj kriis ‘Hej, palmejranoj!’, pro la verda koloro de unu el la popularaj brazilaj futbalteamoj.

Kaj multaj diversaj aferoj okazis ene de la domo. Ekologia padumado, plaĝa flugpilkado, muzikprezentado de Rogener, frenezeta grupa ludo "kion vi farus se...?", spektado de filmoj "La Tigro kaj la Drako" kaj "Reĝino Margot" (krom komentado de "La Granda Diktatoro" de Chaplin), babilado kaj babilado, interrilatigaj ludoj organizitaj de Giovana kaj Ísis, nokta muzikado de talentaj Sônia Sánchez, Lucas, Giovana, Rogener kaj Lunazzi.

Kiuj ne partoprenis maltrafis la ege bongustan fazeolon kuiritan de Vera Lúcia! Hmmm, bongustega! La kuirado estis komuna, ĉiuj kuirantaj por ĉiuj. Ĉiuj helpis purigi la kuirejon. Parolante kaj kantante oni rapide finis kaj iris babilu iom pli en la ampleksa vizitĉambro.

Avida cirklo ĉirkaŭ la nemalfermebla vinbotelo de Lunazzi. Oni rompis korktirilon, sed la damna botelo malfermiĝis, je Bako!



Dum la ludo "Kion vi farus se...?", gvidata de Rogener, ĉiu devis verki sur papereto la plej absurdan demandon kaj aliulo devas respondi al tio. Sed poste, la paperetoj estas rikoltataj, hazarde distribuataj kaj oni legas unu demandon kaj alies respondon. Ofte estas tre ridigaj koincidoj, sed foje eĉ hazardo montriĝas saĝa. Aperis la plej strangaj kaj amuzaj demandoj kiel: "Kion vi farus se ge-Ledon aperus al vi kaj dirus, ke via misio estas konvinki George Bush igi esperantisto?", "Kion vi farus se Renato Corsetti nomumus vin 'Komisiito pri Senutila Agado de UEA'?", "Kion vi farus se la tuta homaro mortus kaj restus nur vi en la mondo?" ("okazus la fina venko de Esperanto!" konkludis James) aŭ "Kion vi farus se la maro dum la Amika Jarfino malaperus?". Plej frenezaj respondoj hazarde estigis kiel "Mi saltus kaj kantus", "Mi ĵetus ĝin en la maron" aŭ "Mi esperantigus la tutan mondan hundaron"...

Neordinaran sperton travivis la bebo Jean Piton: la gepatroj povis en Esperanto fari kuracistan konsulton al E-parolanta pediatro Alexandre/Ikaro, kiu bedaŭris ne esti antaŭe stariginta la sansekuran servon "EsperantoMED" por iom enspezi dum la plaĝumado.

SUPRE | NOVA ESPERANTO-ENSEMBLO: "MALAMIKOJ DE L' RITMO" ;)

AMIKA JARFINO >

renkontiĝoj | encuentros

PARTOPRENANTOJ

Joel Francisco kaj edzino Vera Lúcia (SP), José Roberto Tenório kaj edzino Conceição (SP), Adalberto de Oliveira Pessoa (SP), Rodrigo de Méo (SP), Marco Zlov kaj edzino Sônia Sánchez (SP), José Joaquín Lunazzi (Campinas), James Piton kaj edzino Ísis Okabe Piton - kaj ilia bebo Jean! (Campinas), Alexandre de Melo (Campo Grande MS), Lucas kaj fratino Giovana (Sao Carlos), Rogener Pavinski (Ribeirao Preto) kaj Aldenora Mendonça (Nova Iguaçu RJ).



Laŭ la buĝeto ebligis mendi, en la lasta punkto de 2003, tre variajn pladojn, fruktojn kaj trinkaĵojn dum la noktomanĝo, sen kroma monkolekto inter la partoprenintoj. Oni surprizis Vera-n per kukoj kaj kandeloj en sia datreveno - krom la tradicia kantado, kompreneble.

La partoprenintoj vere konkretigis la celon de tiu ĉi aranĝo, "Amika Jarfino" - kaj iasence de la esenco de esperantismo mem. Oni havis plene Esperantan etoson, kio jam pensigas nin pri la sama (aŭ simila) aranĝo por la fino de la kuranta 2004! Espereble, kun alilingvanoj. FELIĈAN NOVJARON!

ĈIPAGÊ | AŬTA VICO POR PRENI PRÂMŜIPON
VENONTPAGÊ | OFICIALA FOTO



**"NE ESTAS VOJO AL LA PACO,
la paco estas la vojo"**



NI ESTAS LA ĈAMPIONOJ

ĉuk-pilko!



Je la 6-a de decembro 2003 okazis, en urbo Jundiai (Brazilo), la unua ŝtata ĉampeoneco de Tchoukball (ĉuk-pilko: svislanda pilko-sporto), kun partopreno de 6 teamoj el Sao Paulo, Jundiai kaj Campinas). Post 5 tre lacigaj kaj malfacilaj maĉoj, Esperanto Tchoukball Clube finis kiel **CAMPEONO!**

BILDOJ | NIAJ ATLETOJ LUDANTE FORTE
RAPORTIS | JULIO CALEGARI <TCHOUKBALLBR@HOTMAIL.COM>

MALLONGAJ >>> SED NOTINDAJ!

❖ **BEJO** ĵus inaŭguris **novan retpaĝon**, farita de Felipe Queiroz el Santos (SP). Tajpu: <http://bejoesperanto.tripod.com/eo>

❖ Alia retpaĝo (re)inaŭgurita estas de **BEL**. Jam delonge ĝi estis malaperigita de la reto, precipe pro ĝia malmoderneco, kiu ĝis ia grado, povus eĉ malpropagandi Esperanton. Nun ĝi havas pli bonan vizaĝon, tamen ĝi restas tre maldika je enhavo. Vizitu: www.esperanto.org.br

❖ Brazila Kongreso de Esperanto 2004 okazos en **Maceió** (AL), 18-22 de Julio. La ĉi-jara temo estos "Esperanto en la lernejo". La Kongresejo iam estis Universitato, kaj ĉiuj bone alkitimiĝis al la granda nombro da gejunuloj, kiu beligas la naciajn kongresojn. Ne forgesu: BEJO-anoj ĝuas rabaton! Informiĝu: ariknubxxi@esperanto.org.br

❖ **JUNEASP** estas la departamento pri junularo de EASP (Esperanto-Asocio de San-Paŭlo) kies aktivaĵoj zorgas la aktivulo Rodrigo de Méo. Inter aliaj sukcesoj, JUNEASP realigis artan eventon en Esperanto, en lunĉejo de la reto 'MacDonald's, krom oftajn kunvenojn en aĉetcentroj de la urbo. Nun JUNEASP havas rubrikon ĉe la grava revuo (ne plu malaperinta, UHA!) *La Lampiro*. Kontakto: juneasp@yahoo.com.br

❖ La (famega) duopo **Ĵomart & Nataŝa** lanĉis novan diskon: "Amu Min". La albumo estis registrita kaj miksitaj en ilia propra studio en Stockholmo (Svedio), kaj prezentas 12 novajn kantojn verkitajn de la fama rusa poeto Mikaelo Bronstejn. Aŭskultu: www.vinilkosmo.com

LITOVAJ > VILNIUS, UK '05

Diamante kaj Aida bonvenigas vin al UK en Litovio. Jes, ĝi okazos nur en 2005, do startu vian kurson pri la Raknas lingvo.

“jis ima jo knyga” =
“la libro estas sur la tablo”



MALSATAJ > I. COMPRIDA, NJT '04

Niaj "jarfinanoj" riveligis en... la kuirejo! Rodriks kaj Giovana faris tre bongustan dolĉaĵon ("brigadisto") por *Nov-Jara Tago*.



HIP-HOPAJ > BELO HORIZONTE '03

Antonio repas al junularo dum la lasta Brazila Kongreso de Esperanto.

“Esperanto estas nova kanto; mia kaj via, la lingvo internacia!”



LIBERIANIN' >>>

MICHAEL JACKSON

(Naku penda piya / naku taka
piya / mpenziwe)
(Ankaŭ mi amas vin ankaŭ
mi volas vin mia kara)

Liberianin'...
Vi venis kaj venkis min
Sincera ekam'
Liberianin'...
Konkeris la koron, in'
Jen sent' de ĉiam'

Liberianin'
Vi scias ke venis
Venkonte min,
Samkiel en filmoj
Kiam geamantas du
Kaj ŝi flustras al li "ĉu
Vi min amas?" kaj li plu...
"Mi amas vin, Liberjanin' "

Liberianin'
Pli fajna ol ajna gem'
La amo de vi
Liberianin'...
Vi kisas min,
Ho, destin'
Ke faras vi ĉi

Liberianin'
Vi scias ke venis
Venkonte min,
Samkiel en filmoj
Kiam geamantas du
Kaj ŝi flustras al li "ĉu
Vi min amas?" kaj li plu...
"Mi amas vin, Liberjanin' "

Liberianin'
Vi scias ke venis
Venkonte min,
Atendas mi tagon
Kiam diros vi "ho jes!"
Kaj mi samon kun ridet'
Kaj ĉiamos la konfes'
Mi amas vin, Liberjanin', je
etern'

(In')
Mi amas vin, Liberjanin', je
etern'

(In')
Mi volas vin
Mi amas vin kara
(In')
Mi amas vin kara,
mi volas vin kara, hu!

INTERVJUO >>>

MAJORO GILBERTO SILVA VELHO

Kiel sekretario de BEJO, unu el miaj devoj estas kontroli la ricevadon de leteroj al nia Organizo. Afero kiu tre mirigas min, estis tio, ke ni daŭre ricevas la tradician informilon "Esperanto Notícias". Ĝi estas informilo dekpaĝa, en papero "ofica", farita per tajpmaŝino kaj plena je novaĵoj pri E-movado. Oni povas demandi: "kaj do, kie kuŝas la surprizo?! Estas multaj informiloj!" Mi klarigas: la redaktoro estas *Majoro Gilberto Silva Velho*, kiu loĝas en *Caçapava* kaj estas nia juna BEJO-ano plej maljuna!:-) Li estas 92-jara kaj plu aktivas, eldonante tute sola, jam de 19 jaroj, la bultenon Esperanto Notícias. En Marto mi renkontis lin partoprenante de Esperanto-Renkontiĝo de Sudparaíba Valo en *Caraguatatuba*.

Majoro: Elkoran saluton, mi estas *Gilberto Aquino da Silva Velho* naskiĝinta en *Curitiba*, Paranao, en la 5a de Junio de 1911. Poste, kun miaj gepatroj (ingeniero Jose Maria da Silva Velho kaj klasika pianisto Marcelina Aquino Velho) mi loĝis en Rio de Janeiro, Salvador kaj Sao Paulo, kie mi alvenis ie la fino de 1919.

Momenton: Vi estis tre juna kiam vi partoprenis en la Revolucio de 1932. Ne multaj junaj brazilanoj iam spertis militon. Ĉu vi timis alfronti la morton?

Majoro: En la dua de Decembro de 1925 mi fariĝis piedsoldato, mi estis 14 kaj duono jaraĝa. En Decembro de 1926 en *Erval* kaj *Campos Novos (Sta Catarina)*, mi batalis kontraŭ kolumno komandata de majoro *Leonel Rocha*; en 1930, mi estis en la sektoro de *Itararé (SP)*.

INTERVJUIS | ISIS OKABE PITON (CAMPINAS/SP)
DEKSTRE | LA MAJORO DUM BKE-RENKONTIĜO EN ANAPOLIS (GO)





ĈIPAĜE | LA PONTO SUR LA RIVERO KWAI, EN KANCHANABURI, TAJLANDO (2004).

En 1932, dum la “Konstitucia Revolucio”, mi batalis en la sektoroj “Serra da Mantiqueira/Tunel” kaj en Paraibavala “Eng. Neiva”. Pri la morto mi ne timas. La morto estas flanke de ni ekde nia naskiĝo. Mi skribis artikolojn al la ĵurnaloj: “Ĵurnalo de la Urbo” de *Jundiaí* en 1975 kaj “Ĵurnalo de Taubaté” en 1979 en kiuj mi parolis pri la Revolucio de 1932.

Momenton: Kiel kaj kiam vi ekkonis kaj lernis Esperanton? Kiom da Brazilaj Kongresoj kaj renkontiĝoj vi jam partoprenis?

Majoro: Mi eklernis Esperanton en la urbo *Jundiaí*, ĉe la mortinta Jundiaí Esperanto-Grupo en la jaro 1964/65. Mi partoprenis plurajn eventojn, ekzemple la “Seminário Brasileiro de Esperanto”, jam en 1968; diversaj renkontiĝoj en la 80aj kaj 90aj; kaj multaj, MULTAJ “BKE”!! Kaj certe mi neniam forgesos la “Konvencio en

Niteroi” (1966), kie ĉeestis Kuracisto kaj Kapitano *Álvaro Fausto de Sousa* kaj liaj tri filoj, inter aliaj gravuloj.

Momenton: En kiuj kampoj de E-movado vi jam aktivis?

Majoro: Ekde Decembro de 1968 mi organizis E-ekspoziciojn en multaj brazilaj urboj: *S.J. dos Campos, Caçapava, Pindamonhangaba, Taubate, Jundiaí, Campinas, Rio Claro, Piracicaba, Juiz de Fora, Uberaba, Uberlândia, Natal (RN), Lorena* kaj aliaj.

En Oktobro de 1986, mi iniciatis la eldonado kaj pubikado de informilo, “Esperanto-Notícias”, tiu estas sole kaj mi daŭras ĝia publikado ĝis nun.

Momenton: Kiu estas la sekreto por esti aktiva kiel vi en tiu aĝo?

Majoro: La sekreto de mia aktiveco ĝis 92 jaroj estas: *labori kaj labori!*